



INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO

2007-01

Januaro 2007

ISSN-1612-7927

ina-asocio@web.de

www.esp-ina.com

€ 3,50

Invito al 1-a Internacia Scienca Seminario de Tajcio en Chang- chun



**Zhang Jiping instruis
Tajcio dum la 2-a INA-
Konferenco en Ŝanhajo**

Tajĉio

Okazos la 1-a Internacia Scienca Seminario de Tajĉio en Changchun urbo, je 5-11 de aŭgusto, 2007. La seminario estas sankciigita de loka registara

estos epokfara en disvolviĝo de Tajĉio. La seminario antaŭvidas diversajn lecionojn dum semajnaj tagoj, antaŭtagmeze kaj posttagmeze. Kaj fine estos vojaĝa linio pri Tajĉio en Ĉinio. La laboraj lingvoj estos la angla, Esperanto kaj la ĉina.



oficejo kaj iniciatita de Jilin Esperanto Asocio. Tio estos la unua fojo ke Tajĉio staras kiel moderna fako de scienco, kun la temo **“Tajĉio en tutmonda disvolviĝo”**. Sendube la seminario

Do mi esperas ke, se eblas, vi povos partopreni en la seminario. Kaj, esperantistoj ĝuos rabatan elspezon por la kotizo, nur 80 eŭrojn (aliaj neesperantistoj pagos 350 eŭrojn minimume). Bonvolu viziti la tttejojn de TSS1:

www.01248.cn/tss1 (ĝis nun nur angle), kiu prezentas al vi detalan informon: pri la Unua Bulteno, pri la seminario temo, pri lecionoj, kaj pri elspezoj.

Zhang Jiping

La cepo

*Irma Ivanov-Hirsch, kuracisto,
Germio-Rusio*

*"La cepo tiom multe valoras,
same kiel unu tuta apoteko"*

Paracelsus

La cepo devenas el Okcidentazio kaj estis disvastiĝinta en la tuta Oriento kaj Mediteraneo. Ekde minimume 4000 jaroj oni celite kultivigis la cepon kaj tiel ĝi estas unu el la plej malnovaj kulturaĵoj de la homaro. En la tempoj de la plej

maljuna egipta dinastio oni plantis ĝin en la areo de Nilo kaj ĝi apartenis al la plej oftaj oferaĵoj.

La romianoj alportis la planton tra alpoj. Oni mencias la cepon en la jaro 826 en mapo de la St. Galena abatejo. En tiu ĉi tempo ĝi jam apartenis al nutraĵoj en Eŭropo.

La plantolibroj de la 16-a kaj la 17-a jarcentoj priskribas la efikon de la cepo kontraŭ vermoj, tusado, haŭtblazo kaj und urinreteno.

Ingrediencoj

- eteraj oleoj
- oleo kun sulfidoj (pro ĝi venas ploroj)
- sukero, vitamino, flavonoidoj, pektino
- mineralaĵoj



kon-

traŭn-
flamaj
aĵoj

Kuraca efiko

La supraĵaj sulfur-enhavaj interligoj en la cepo efikas kiel natura antibiotiko. La cepa balastaĵo (1,8 g/100 g) protektas la digestadon kaj povas redukti la kolesterolan kvanton en la sango. La popolaj grupoj, kiuj manĝas multe da cepo, pli malofte ekmalsanas je la stomak-kancero ol la aliaj. Responde-cas tion precipe la sulfidoj, kiuj protektas (akcelas) la salivo- kaj la stomakoglandojn. Inter alie ili enhavas ankaŭ koncentraĵon de flavonoido kvercetino, kiu protektas la angiojn de arteriosklerozo.

La cepo stimulas la sangocirkuladon de la stomakaj mukozoj kaj ĉesigas ĉiujn putrado- kaj sepsajn procesojn en la korpo, ĝi ankaŭ stimulas la funkcion de la koro.

La naturkuracado ankaŭ konscie uzas la urinigan efikon de la cepo.

Pruviĝis la cepo ankaŭ ĉe tusado kaj malvarmumaj malsanoj. Ekz. kiel kontraŭtusada siropo el cepa suko kaj mielo aŭ en formo de homeopatia medicinaĵo ĉe nazkataro.

La ekstera uzado de la cepa suko (masaĝoj) povas mildigi la dolorojn ĉe reumatismo kaj iskiatiko.

Receptoj:

1) Cepa suko ĉe tusado

Ingrediencoj

- 500 gramoj da cepo
- 1 litro da blanka vino (duonseka)
- 150 gramoj da mielo

La preparo:

La cepon dismalgrandigi kaj miksi kun unu litro da blanka vino kaj 150 gramoj da mielo. Lasi ĝin en la ujo ĉirkaŭ 48 horojn kaj poste tralasi la miksaĵon tra kribrilo.

Tri foje tage trinki malgrandan glaseton de tiu ĉi trinkaĵo, tiom longe ĝis oni sentas pliboniĝon

Certe tio koncernas precipe la nefortan tusadon.

2) Cepa suko kontraŭ tusado sen alkoholo

Ingrediencoj

- 1/4 litro da akvo
- 1 tea kulero da sekigita salvio
- 1 tea kulero da timiano
- 100 gramoj da dismalgrandigita cepo
- 100 gramoj da bruna sukero

La preparo

La akvon miksi kun la salvio, timiano, cepo kaj sukero kaj kuireti kun la fermita pot-kovrilo tiom longe, ĝis la su-



kero dissolviĝos. La miksaĵon kribri kaj enboteligi ĝin en glasoj kun bona ŝraŭbebla kovrilo.

Ĉi tiun alternativan sukon oni povas konservi unu semajnon en la fridujo.

La ĉakroj (7)

Kees Ruig, Nederlando

La 6-a ĉakro nomiĝas Aĵna ĉakro aŭ la tria okulo. Ĝia centro situas iom super la punkto meze inter la brovoj. Iam ĝi estis konsiderita kiel la lasta ĉakro de la homo. Ĝi estas la (ofte per juvelo) markita de Hindoj per koloro de sia kasto (t. n. „tikla“). Fizike tie troviĝas en la kapo la hipofiza glando. Pernerve ĝi estas ligita i. a. al la okuloj. Kiam mallumiĝas, ĝi ricevas signalon pri tio de la okuloj kaj produktas ĥemiaĵon, kiu enkondukas la dormon. Do iel vere estas tria okulo. La ĉakro asociiĝas kun inteligenteco, kompreno, envido, konscio, meditado, intuicio kaj okulta

scio. Klarvideco, antaŭvido aŭ antaŭsento de aferoj estas elmonro de malfermita tria okulo. Nebalancita aĵno povas rezulti en konfuza menso, negativaj prognozoj, neado de lecionoj pri la vivo, fantaziado, iluziado, fabulismo. Ĉi tiu ĉakro regas la regionon de la okcipita osto. Ĝi estas ligita al la kognitivaj funkcioj.

Klare estas, ke al aĵno apartenas la elemento „lumo“. Budho ja estis lumigita. La senso, kiu rilatas al ĉi tiu ĉakro estas do la 6-a senso: la subita (senracia aŭ nekonscia) kompreno. La tria



okulo agas per la hipofozo kaj influas la menson. Ĝi kontrolas la zorgemon. La cifero 6 reprezentas i. a. la harmonion. Ja devas regi harmonio inter racio/intelekto kaj menso/spirito.

La muzikinstrumento, kiu apartenas al la tria okulo, estas la (forte) piano kaj la influanta sono estas „la“. Ĝia koloro estas indigo/violkolora. Ĝi kovras la aĝperiodon de ĉ. 35 - 42 jaroj. En tiu periodo oni ofte atingas la ambician pinton de la kariero, aŭ oni konkludas, ke la irita kariervojo tamen ne kontentigis, ĉar ne gvidis al la dezirinda celo. Aŭ eble pli ĝuste: la celo ŝanĝiĝis pro mensa maturiĝo, spirita kreskado. Ofte 42-jarulo spertas „duan junaĝon“.

La ĉakroj (8)

La lasta ĉakro estas la Sahasrara aŭ verta ĉakro. Same kiel verto ne estas en la kapo sed sur ĝi, tiel la sahasraro troviĝas sur la supro de la kapo. Tial longtempe oni konsideris la trian okulon la lasta ĉakro de la korpo. Do ordinaraj homoj havis nur 6 ĉakrojn, nur sanktuloj kaj bodhsatvoj havis 7. La haloj ĉirkaŭ la kapoj de sanktuloj reprezentas tiun 7-an ĉakron kaj la tonsuro ĉe pastroj kaj monaĥoj estas simbola redono de tiu plej alta ĉakro. Tamen nun estas ĝenerale akceptite, ke ni ĉiuj havas 7 ĉakrojn. Krome, kvankam ĝi troviĝas super nia fizika

korpo, ĝi ja troviĝas en niaj subtila kaj astrala korpoj.

La vertoĉakro reprezentas la plej altan veron, spiritecon, meditecon. Ĝia malfermeco montriĝas per la disradiado de kreiveco, kosma unueco, pura konscio. Senbalanco montriĝas per timo aŭ rezisto kontraŭ la realiĝo de spiritaj eblecoj, korligiĝo kaj sinfiksiĝo al materiaĵoj, manko de spirita energio.



La tonsuro de Martin Luther en grafikaĵo de Lucas Cranach la pli aĝa.

Ĉi tiu ĉakro ligiĝas precipe al la 2 fontaneloj, regas la regionon de la kraniosto (os parietale) kaj agas per la epifizo.



Statuo de la benanta Kristo en Rio de Ĵanero

La elemento estas la lumo, t.e. la „lumo“ malantaŭ la lumo.

Laŭdire la animo, la spirito, forlasas la korpon ĉi-tie. Estas okulfrape, ke en diversaj ĝermanaj lingvoj la vorto por „lumo“ kaj „malpeza/leĝera“ estas sama (light, licht). La muziko kiu povas distri la sahasraron estas tiu de arĉinstrumentoj, ekz. la violono. La ĉakra sono estas „si“.

La koloroj kiuj koncernas ĝin estas (ultra)viola kaj blanka. Kiel vi scias, blanko estas la tuto de ĉiuj koloroj. Mi nomu ankaŭ purpuron ĉi-rilate; ĝi estas mikskoloro de violkoloro kaj

ruĝo. Ĝi do ligas finon kun komenco, ĝi reprezentas la ripeton aŭ eternecon. Ĝia simbolo estas la 1-a kaj ne hazarde ĝi retroviĝas en la cifero 8.

La 8-a ĉakro estas tiu de la manoj. Ni povas streĉi niajn manojn ĉielen super nian kapon, gesto ofte ligita al religio, do vere gesto de religio (la originala signifo de religio) de la homo kun la universo. Sed ankaŭ estas la sinteno por malfermiĝi por universala energio, kiel branĉoj de la arbo (komparu kun la vivarbo aŭ kabalo), kvazaŭ anteno inter tero kaj kosmo.

Sed kun la manoj ni ankaŭ facile povas tuŝi la aliajn ĉakrojn, do ankaŭ la bazon, la ruĝan aŭ la teron. Fermiĝas la cirklo (ŝajne, ĉar envere estas projekcio de spiralo tra 360 gradoj).

La koncerna aĝlimo estas de ĉ. 42 ĝis pli ol 50 jaroj.

Tio estas la periodo, en kies komenco la homoj ofte maltrankviliĝas pro la „dua juneco“. Estas tiuj, kiuj ne kontentatas pro kio ili estas atingintaj en sia ĝisnuna kariero kaj vivo kaj kiuj nun akceptas duan defion, ofte en tute alia (ofte pli idealisma, malpli materia) direkto. Kaj en la fino de tiu periodo la ambicio malaperas. Oni ne volas estri, sed transdoni, konsili. La vastan S+S (scio kaj sperto, angle K-H, know-how) ili ne plu volas ekspluati por estri firmaon aŭ institucion, sed prefere por transdoni al plijunuloj, la posta generacio. Tio donas al ili multe pli da kontenteco, ofte je ilia granda miro, ĉar antaŭe ili estis tiom ambiciaj.

La posta aĝperiodo, ofte tiu de pensiiĝo, povas esti rigardata kiel tiu de la 8-a ĉakro (envere subĉakro de sahasraro). Same kiel infano oni ne (plu) havas fortan ambicion, sed la libertempon. Iel oni povas kompari tion kun ĵudo: komencanta ĵudano portas la blankan rubandon. Post kreskado en la sporto li ricevas sinsekve rubandojn de diversaj koloroj, ĝis li fine atingas la plej altan ŝtupon. Tiam li ricevos la blankan rubandon.

Kompreneble estas homoj, kiuj ja havas fortan ambicion, ankoraŭ forte laboras, estras kompanion, volas ludi sian (ekonomian aŭ politikan) rolon en la mondo: homoj kiuj pensas, ke ili estas nemankeblaj en la socio. Envere ofte homoj, kiuj ne havas hobion aŭ eksterprofesian interesiĝon. Klare, ke ili ne tute maturiĝis, ie en la ĉakro estas blokado. Eble ili vivadas tro multe el sia 3-a ĉakro kaj ili ŝatas dorloti sin en ties suno.

En ĉi tiu rilato mi volas rimarki, ke eble la viv/aĝperiodoj de 7 jaroj nun ne plu plene valoras. Antaŭ duonjarcento 50-jarul(in)o estis sufiĉe maljuna ul(in)o. Nuntempe eĉ 70-jarul(in)o ne ankoraŭ sentas sin maljuna, sed energia kaj aktiva. Do eble la aĝperiodoj devas adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj. Estas ja nur simboloj, do ĉiu interpretu ilin laŭbezone. Estas nur la sinsekvo, kiu ne ŝanĝiĝas kaj valoradas.

La ĉakroj (fino)

Al la ĉakroj oni povas ligi ankoraŭ aliajn aferojn, ekz. ĉielkorpojn. Ankaŭ tie la simileco estas okulfrapa. Ekz. Marso, la dio de la batalado por la baza ĉakro, aŭ Merkurio, la dio de la komerco por la tria ĉakro. Aŭ la ligo kun vokalaj literoj l (j) ĉe la baza ĉakro estas la plej ferma vokalo. Ĝi montras internen (introverto). A (tria okulo) estas la plej malferma kaj montras eksteren

(ekstroverto). Sentu vi mem per kantado de la sinsekvaj vokaloj IEHOUA. Ĉe ĉiu vokalo la buŝo iom pli malfermiĝas kaj ne nur la buŝo. Facile kontroleble per la formo de la gorĝo kaj la buŝo kaj la spirfluo tra ili. Do I estas egocentra, A estas altruisma. Se oni legas la literojn sinsekve, oni ricevas la judan nomon por dio „JEHOVA“. Inverse, se la energio venas de la alia flanko kaj trairas vin, vi ricevas sonaron, kiu reprezentas la mantron Ohm/Auhm.

Fakte la hindoj atribuas po mantro al ĉiuj ĉakroj. Vidu la sinoptikon. Oni vidas ankaŭ la diversajn nivelojn de amo en la unua, dua, kvara kaj sepa ĉakroj (en la 7-a ĉakro vi estas la amo mem), nome sinsekve seksumo, amoro/amo kaj „agape“.

En Hindio oni ligas la ĉakrojn ankaŭ al aliaj simboloj kiel lotusoj kun diversnombraj petaloj, figuroj kiel trianguloj, kvadratoj, arkoj ktp. aŭ koloroj, kiuj estas diferencaj de nia ĉielarko kiel arĝento kaj oro.

Ĉakroj ludas gravan rolon en la diversaj Jogaj skoloj, en tanro, en daŭismo (taoismo), en la diversaj terapioj (i.a. ajurvedo kaj rejkio). Kompreneble la limiteco de nia bulteno ne permesas prilumi ĉiujn aspektojn de la ĉakroj kaj pridiskuti ĉiujn detalojn (kiel la „Ĝusta“ nombro de korpoj ktp.). Tamen eble tre interesaj aferoj restis nemenciitaj. La kono kaj scio pri ĉakroj atingis la aziajn

kaj eŭropajn landojn el Hindio. Sed kompreneble ankaŭ Afrikanoj kaj (pra-)Amerikanoj havas la samajn ĉakrojn.

Ĉu la malnovaj kulturoj de la Indianoj, Maorio, Aŭstralaj aŭ Afrikaj triboj iel konis la ĉakrojn? Mi volonte invitas gelegantojn reagi al ĉi tiu artikol-serio per alsonoj, rimarkoj kaj kritiko.

Kio estas apiterapio?

D-ro med. Stefan Stangaciu

Bukarest, Rumanio

Prezidanto de Germana Apiterapia

Asocio

Koncize dirite, apiterapio estas uzo de abelaj produktaĵoj en preventado, kuraco aŭ resanigo de homo kontraŭ unu aŭ pluraj malsanoj. La etimologio de tiu vorto klarigas sin mem: “api” devenas de la latina nomo por la abelo (apis), kaj “terapio” devenas de la greka vorto "therapeuein" (kuraca metodo por homoj kaj animaloj kontraŭ diversaj malsanoj).

Preventado de malsano signifas:

- detruon de potencialaj „malamikoj“ antaŭ ol ili eniras la homan korpon;
- stimuladon de korpopropraj “fortoj” por detruo de la malamikoj, kiuj penetris en la korpon, antaŭ ol aperos

klinikaj simptomoj (febroy, inflamo, doloro ktp.).

Kuraco fakte signifas klopodon resanigi iun. Ĝi eble sukcesos, eble ne, ĉar



La hejmo de la abeloj

Resaniĝo signifas, ke la homo reakiras normalan sanstaton post la malsano. Alivorte la korpo, memorkapablo kaj spirito funkcias almenaŭ same bone, kiel antaŭ la malsano. Tre ofte oni uzas la vorton resaniĝo por postkirurgia kuraco, lige kun pliboniĝo post diversaj traŭmaj kaj infektaj malsanoj, sed ankaŭ ĉe paso de banala malvarmumo.

Sanigo signifas tutan likvidon de konkreta malsano kaj ties simptomoj.

la rezulto dependas de diversaj faktoroj.

Laŭvorte apiterapio signifas klopodon resanigi iun helpe de abeloj kaj per iliaj produktaĵoj. Tamen hodiaŭ apiterapio havas pli vastan signifon...

Apiterapio estas ne nur simpla terapia metodo, sed ankaŭ aparta specio de medicino. Ni povas nomi ĝin ankaŭ apimedicino. Kial?

► Ĉar apiterapio fakte estas scienco; ĝi havas striktan sciencan bazon malgraŭ tio, ke ekzistas tuta serio da dume neklarigitaj “sekretoj”.

► Ĝi estas scienco, ĉar dum kuraco de malsanulo la kuracisto ĝuste scias, kion li devus fari. Oni bezonas p e r fektan d i a g nozon k a j

d e v a s ĝuste scii, kiu estas la plej bona metodo por la kuracado de la medicinaĵo. Plue, la dozado devas esti tre bone konata.

► Apiterapio estas scienco, ĉar ĝi ebligas escepte multajn reprodukteblajn rezultojn. Tio signifas, ekzemple:

- ke propolisio ĉiam detruos certan kvanton da helikobakteria piloro (*Helicobacter pylori*)
- ke post abelpiko la abelveneno stimulas la kortizolsekrecion.

► Apiterapio estas arto, ĉar oni havas rilaton al ĉio tio, kion la spirito de la Patri-no Naturo donis al la h o m o : a- mon,

a-

m i- ke c o n , esperon, komprene-mon, sed ankaŭ m a l e s p e r o n , malamon, vantecon ktp.

► Ĝi estas arto, ĉar oni devas esti vera “artisto” por konforma adapto de ĝi; oni ĉiam devas konservi en la animo la belecojn de la naturo kaj dividi



INA estas la oficiala organo de Internacia Naturkuraca Asocio

Eldonejo: MZ-Verlag Ltd.
Schoolbrink 12, 27383 Scheessel,
Germanio. Rete: info@mz-verlag.de
www.mz-verlag.de

Ĉefredaktoro: Harald Schicke

Adreso de INA:

Harald Schicke
Schoolbrink 12, 27383 Scheessel
Germanio
Tel: +49 4263 94087
Fax: +49 4263 94088
schicke@mz-verlag.de

Adreso por korespondado:

Rosa Ebel, Schmiedestr. 99
47809 Krefeld, Germanio

Retadreso:

ina-asocio@web.de
www.esp-ina.com

tiun veran trezoron de la naturo fratece
kun la aliaj homoj.

► Ĝi estas arto, ĉar resaniĝo de
homo estas la plej bela evento, kiu
povas okazi al la homo en ties vivo.

► Apiterapio estas “holisma” me-
dicino. “Holisma” (gr.-lat.: derivado de la
tuto el unu unueca principo) signifas
por “tuta”, por ĉia uzo; aŭ por “tuta” ĉia
sanigo.

Apiterapio estas “holisma” ĉar:

► ĝi estas harmonie ligita al multaj
naturaj procezoj.

► ĝi uzas sciojn de aliaj naturaj
holismaj (tutecaj) terapioj, kiel fitotera-
pio (uzo de herboj), aromoterapio (uzo
de volatilaj oleoj), dietoterapio (uzo de
manĝaĵoj), akupunkturo, akupresuro,
ajurvedo (hindia: ayur + veda).

► ĝi grave influas la nervosiste-
mon kaj la sangocirkuladon de la ho-
mo kaj animaloj kaj nur per tiuj du sis-
temoj influas la tutan korpon.

Daurigota

Jam notu:

La 24-an ĝis 25-an okazos la 61-a Kul-
tura Semajnfino de Sarlanda Esperan-
to-Ligo en Homburg. Ĝi havos la te-
mon „Naturkuracado“.

La prezidanto de INA, Harald Schicke,
estas invitita, informos pri INA kaj faros
kune kun aliaj prelegojn pri la temo.

La programo ankoraŭ ne estas tute
fiksita, sed ĝi estos tre interesa, mo-
derpreza kaj en bona etoso.

Petu informojn ĉe:

info@esperanto-saarland.de